

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 83-a radioprelego, 1964.07.01 & 04

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la vivo en Esperantujo. Vi aŭdas Claude Gacond.

Mi salutas fraŭlinon Kohler el Besançon (Francujo), kiu regule aŭskultas niajn elsendojn. Ŝin tre interesis nia elsendo pri John Howard Griffin, la blanka usonano, kiu kuraĝe nigrigis sian haŭton por vivi dum kelkaj semajnoj kiel nigrulo. Ni revenos al la temo rasismo dum tiu ĉi somero.

Sinjoro Manfred Führer el Langenthal (Svislando) estas ankaŭ fidela aŭskultanto. Li rakontas, ke li registris elsendojn en esperanto de diversaj radio-stacioj kaj per eltranĉaĵoj el tiuj registraĵoj faris interesan sonbendon, kiu mirigis neesperantistojn. Li mem tion farante miris pri la varieco kaj kvalito de la nunaj esperantaj kontribuoj ĉe la diversaj elsendejoj de nia kontinento. Lin tre interesis mia raporto pri instru-metodo, kiu permesas ĉiam akcepti novajn gelernantojn dum esperanto-kurso. Li volas elprovi miajn rekomendojn. Por vin helpi, sinjoron Manfred Führer, mi sendas la klarigajn foliojn, kiujn ni disdonas al niaj kursanoj dum ilia unua leciono. Vi certe povos ilin adapti al via estonta klientaro !

Miaj du elsendoj pri la ĝemeliĝo de urboj kaj vilaĝoj interesis kelkajn aŭdantojn, kiuj petis la promesitan broŝuron. Mi salutas tiujn fidelajn aŭskultantojn kaj avertas ilin, ke la broŝuro estas survoje, ĝi baldaŭ atingos vian leterujon, karaj gesamideanoj. Plej multaj petoj venis el Okcidenta Germanio. El Augsburg sinjoro Eugen Schwager rakontas, ke en la jaro 1959 lia urbo Augsburg ĝemeliĝis kun japana urbo Amagasaki dank'al instingo de ambaŭ esperanto-societoj. La urbestroj reciproke vizitis sin. Krome ĉeestis naŭ personoj el Japanujo kiel delegacio, sed bedaŭrinde nur unu iom balbutis esperanton. Ili tamen havis grandan sukceson. Kvankam kapablaj esperantistoj vivas en Amagasaki, ili ne elektis unu el ili por viziti Augsburg, tio estis nekomprenebla por mi, konkludas nia samideano Eugen Schwager. Eble estis financa demando ! La mono ludas ofte grandan rolon en tiuj aferoj. Fraŭlino Ivica Šponar el Oberrad ankaŭ petis la broŝuron pri urboĝemeliĝo, same kiel sinjoro Oskar Breddermann el Eplingen, sinjoro Bruno Siegert el Fürth kaj Gerhard Kunze el Berlino. El Nederlando skribis sinjoro A. de Man el Ede kaj el Hungario sinjoro Pal Balkanyi el Budapeŝto, kiu bedaŭras la neekziston de kajero en la internacia lingvo pri la ĝemeliĝo de urboj kaj rakontas, ke kelkaj hungaraj urboj jam ĝemeliĝis, tiel ekzemple kun la angla Coventry ĝemeliĝis la hungara urbo Kecskemet. En ilia amikec-kontrakto estas punkto pri uzo de esperanto. La urbo Dunaujvaros ankaŭ de du jaroj havas ĝemelurbon, kaj la tieaj esperantistoj deziras pligrandigon de tiu movado por la paca kunvivado.

Vi certe scias, ke en Svislando, tio en la urbo Lausanne, malfermiĝis tre alloga Svisa Nacia Ekspozicio. La 3-an de julio, la 21-an de aŭgusto kaj la 11-an de septembro estos organizata esperanto-gvidado por la vizitantoj. La rendezuo estas je la deka matene antaŭ la enirejo de la preĝejo, kiu staras interne de la ekspozicio. Ni ripetos la datojn de tiuj esperanto-servaj tagoj : 3-an de julio, 21-an de aŭgusto kaj 11-an de septembro. Por pliaj klarigoj simple skribu al la UEA-delegito en Lausanne.

La gazeto **Svisa Fervojisto** raportas pri decido, kiu koncernas nian lingvon, okazinta dum la jarkongreso de la Svisa Fervojista Sindikato. Tiu kongreso kunvenis en Interlaken de la 20-a ĝis la 22-a de majo. 800 delegitoj reprezentis 46'500 aktivajn kaj 14'500 pensiitajn gefervojistojn, tio estas 90% de la organizitaj gefervojistoj en Svislando. Kio interesas nin, tio estas propono de lokomotiv-kondukisto el Lausanne, kiu diras : « *La estraro de la Svisa Fervojista Sindikato estu komisiita agi per la kanalo ĉu de la Internacia Transportlaborista Federacio, ĉu de la Svisa Sindikata Unuiĝo aŭ de la Internacia Asocio de Liberaj Sindikatoj, por ke esperanto estu enkondukata kiel deviga lerneja fako en ĉiuj landoj aliĝintaj al la Eŭropa Ekonomia Komunumo aŭ al la Eŭropa Unuiĝo de Libera Interŝanĝo.* » (Fino de la citaĵo.) La rekomendo, kiun la gvida komisiono de la Svisa Fervojista Sindikato faris al la

Vivo en Esperantujo

Claude Gacond, 83-a radioprelego, 1964.07.01 & 04

kongresanoj estis favora al nia lingvo, sed ĝi iom ŝanĝis la celon de la propono ĵus legita, ĉar fervojista sindikato posedas nur kompetentecon en sindikataj aferoj, kaj ne en lernejaj aferoj. Kio estas unika, tio estas, ke la vicprezidanto de la Svisa Fervojista Sindikato, samideano Haudenschild, klarigis kaj motivigis la necesajn ŝanĝojn en la lingvo esperanto. Post tio, la 800 delegitoj unuanime akceptis la proponon. La Svisa Fervojista Sindikato transdonos sian proponon al la Internacia Transportlaborista Federacio. Nun la sukceso de tiu decido dependos ĉefe de tio : ĉu aliaj fervojistaj sindikatoj en Eŭropo sekvos la ekzemplon de la Svisa Fervojista Sindikato. Inter la aŭskultantoj eble troviĝas fervojistoj, ili provu influi sian propran sindikatan sekcion ankaŭ farante proponon, kiel tiu de la lokomotivisto el Lausanne.

Por resti en la temo fervojo mi mencias, ke la Eŭropa Fervoja Horarkonferenco, kiu okazis pasintan septembron en Sofio, ankaŭ parolis pri nia lingvo. Ĝi konstatis, ke ĝi ne havas la povon ordoni en kiuj lingvoj devas esti enskribitaj la ĝeneralaj rimarkoj en la naciaj horaroj, sed tamen ĝi rekomendis la uzon de esperanto inter la fremdaj lingvoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri la vivo en Esperantujo.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-